

La unuaj jaroj de la gazeto L'ESSOR.
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1981 januaro 01 kaj 03.

(sonregistraĵo mankas)

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni raportis pri la gazeto [L'ESSOR](#), kiu festas sian [sepdekkvinan vivjaron](#). Ni diris, ke tiu sendependa gazeto religie, socie kaj kulture influis la publikon en la protestanta franclingva Svislando, tio estas en la kantoj Ĝenevo, Vaŭdo, Neŭŝatelo kaj Berna Ĵuraso.

A.- La altira personeco de *Paul Sublet*, la unua redaktoro de L'ESSOR donis al la gazeto ĝian apartan spiriton.

Cl.- *Paul Sublet* naskiĝis en Lausanne en 1871. Li studis teologion en tiu ĉi urbo, en la kadro de la libera protestanta eklezio. La funkcion de pastoro li plenumis unue en Belgio, en la urbo Namur, kaj poste en Svislando en la vilaĝo *Vallorbe*. *Paul Sublet* finis sian vivon en Ĝenevo, kiel sekretario de internacia organizaĵo filantropa.

A.- Kiel redaktoro, *Paul Sublet* havis tre originalan sintenon. Li ne rezervis partojn de sia gazeto L'ESSOR al precizaj rubrikoj. Sur la unua paĝo de lia gazeto oni povis trovi altnivelajn studojn pri religia aŭ morala temo, aŭ denuncon pri nesalubraj loĝejoj, aŭ informon pri la Ligo de la Aĉetantoj, ktp.

Cl.- *Paul Sublet* ŝatis malfermi sian gazeton al la reagoj de la legantoj. Senkommentarie li publikigis la leterojn, kiujn li ricevis, kaj en konkluda artikolo li ĉiam esprimis nuancitan opinion, provante iel sintezi la kontraŭajn vidpunktojn, kiuj libere esprimiĝis dum pluraj semajnoj. Tiuj liberaj diskutoj, kie iu ajn povis esprimi ion ajn, estis io tute nova en Svislando, kiam la gazeto L'ESSOR naskiĝis en 1906, kaj ankoraŭ nun restas maloftaĵo.

A.- Tiuj diskutoj, laŭ *Paul Sublet*, devis unuigi, anstataŭ akriigi la dividojn, kiel kutimas fari la partiemaj gazetoj. Povi koni la precizajn vidpunktojn de kontraŭulo kaj povi esprimi al li la propran vidpunkton, tio estas privilegio malofta.

C1.- *Paul Sublet* per la gazeto L'ESSOR pledis favore al precizaj kaŭzoj, kiel la proporcia reprezentado en la elektoj, la virina voĉdonrajto, la reduktado de la laborhoraro, ktp. Eĉ en la kadro de tiuj kampanjoj la gazeto L'ESSOR publikigis kontraŭajn vidpunktojn.

A.- Okaze de gravaj voĉdonoj, la gazeto L'ESSOR publikigis specialajn numerojn, kie ambaŭ vidpunktoj estis detale prezentitaj. La legantoj devis mem konkludi. Ankaŭ tio estis io tute nova.

Cl.- *Paul Sublet* per sia gazeto L'ESSOR ne kontentiĝis denunci sociajn mankojn. Priluminte maljustaĵojn, li poste raportis pri pozitivaj realiĝoj, provante komprenigi, ke la ŝanĝoj estas ĉies afero. Kaj li nete distingis inter socia justeco kaj patroneca bonfaro.

A.- Abundas la novaj ideoj, kiuj diskoniĝis pere de la gazeto L'ESSOR sub la redaktado de *Paul Sublet* inter la jaroj 1906 kaj 1915. Kompetentaj kunlaborantoj raportis pri fakaj temoj. Tiel aperis artikoloj de *Auguste de Morsier*, la prezidanto de la Ligo de la Aĉetantoj, de la franca ekonomiisto *Charles Gides*, de la pedagogoj *Pierre Bovet* kaj [Adolphe Ferrière](#). Estis publikigitaj raportoj pri la ŝparkaso Raiffeisen, pri la konsum-kooperativoj, pri loĝej-

kooperativoj, pri feriejoj, pri la kreo de popol-domoj, pri la skolta movado, pri la moderna pedagogio, pri la ritma gismaastiko de Emile Jacques-Dalcroze, ktp.

Cl.- Per la gazeto L'ESSOR *Paul Sublet* volis kontribui al la ekflorigo de individuecoj aŭtonomaj. Kiam lia subita morto en 1915 senigis L'ESSOR de redaktora gvido, oni troviĝis en milita periodo kaj la gazetkapitalo estis elĉerpita. *Auguste de Morsier* lanĉis alvokon por la savo de la gazeto el tiu krizo. Li estis aŭdita.

A.- [Paul Pettavel](#), pastoro en la urbo La Chaux-de-Fonds, transprenis la redaktadon de la gazeto. Tiam la temo milito kaj paco, la defendo de militrifuzantoj kaj la organizo de helpagadoj anstataŭas la pure sociajn priokupojn. *Edmond Privat* publikigas unuan artikolon en 1916 responde al *Adolphe Ferrière*, kiu proklamas la neceson neniigi Germanion por neniigi la perfortemon. *Edmond Privat* defendos pli nuancitajn vidpunktojn inspiritajn de la artikoloj de *Hector Hodler* aperintaj en la gazetoj *Esperanto* kaj *La Voix de l'Humanité*, pri kiuj ni raportis en nia prelegaro pri la fondinto de UEA. *Hector Hodler* ne rekte skribis en L'ESSOR.

Cl.- Ekde 1919 ĝis 1922 *Adolphe Ferrière* gvidas la redaktadon de la gazeto. Li estas sociologo kaj pedagogo. Li fondis en 1899 la Internacian oficejon de la modernaj lernejoj, en 1912 la [Instituton Jean-Jacques Rousseau](#). *Adolphe Ferrière* opiniis, ke post la mondmilito kaj la sociaj konfliktoj kiuj ĝin sekvis, komenciĝis nova erao. Tiurilate li havis vastajn projektojn, kiuj esprimiĝis per la redaktado de specialaj numeroj de L'ESSOR, kiuj titoliĝis "Nova Svislando", "Nova Religio", "Nova Filozofio", "Nova Edukado", "Novaj Lernejoj", "La Universitato de 1^a Estonteco", ktp... Por larĝigi la aŭdiencon de la gazeto, li ŝanĝis ĝian titolon, kio fariĝas LE NOUVEL ESSOR, kio signifas la nova ekflugo aŭ la nova disvolviĝo. Li instigis organizaĵojn elekti la gazeton LE NOUVEL ESSOR por publikigi siajn raportojn kaj komunikaĵojn. Li invitis multajn fakulojn malfermi sciencajn rubrikojn, kaj la legantaro rapide kreskis.

A.- Tiun ĉi agadon daŭrigis la eldonisto *Henri Chenevard* de 1923 ĝis 1932. Sub lia redaktorado la gazeto LE NOUVEL ESSOR, kiu havis almenaŭ 5'000 abonantojn kapablis eĉ salajri siajn kronikistojn. La gazeto ĉesis aperi ĉiusemajne, ĝi fariĝis monata magazino, kies enhavo estas ege varia. Ĝi daŭre pritraktis sociajn demandojn, sed ankaŭ ĝi malfermiĝis al literaturaj, muzikaj, medicinaj temoj. Pri la rubriko internacia politiko okupiĝis fakulo de la gazeto *Journal de Genève*. Sed malgraŭ tiu ĉi disvolviĝo, la gazeto LE NOUVEL ESSOR konservis la tiel apartan spiriton hereditan de la unua redaktoro *Paul Sublet*. Per vastaj enketoj ĝi malfermiĝis al la vidpunktoj de la legantaro. [Henri Chenevard](#), kiu mem multe skribis en sia gazeto, estis vigla polemikisto, kiu ne hezitis kontesti la decidojn de la aŭtoritatoj.

Cl.- Sed la gazeto LE NOUVEL ESSOR, sub la redaktado de *Henri Chenevard*, fariĝis la posedo de unu homo. Kaj tio havis malfeliĉajn konsekvencojn, kiam la gazeto vendiĝis en 1932 al nova redaktoro. Pri tio ni rakontos la venontan semajnon en tria kaj lasta prelego pri la gazeto L'ESSOR.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond konkludas tiun ĉi paroladon, esprimante siajn bondezirojn okaze de la nova jaro. Ĝis reaŭdo!